



LA "EPOKO" LIBROJ

SERIO DA INTERESAJ ROMANOJ TAŬGAJ POR DISTRAJ HOROJ.
PRESO KLARA — BINDO KARTONA — PAPERO BONKVALITA.

1. **Murdo en la Orienta Ekspreso.** Agatha Christie.
El la angla tradukis "Etulo".
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** F. Molnár.
El la hungara tradukis L. Spierer.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse.
El la angla tradukis G. Badash.
4. **La Tempo-Maŝino.** H. G. Wells.
El la angla tradukis E. W. Amos.
5. **Princino de Marso.** Edgar Rice Burroughs.
El la angla tradukis K. R. C. Sturmer.
6. **Colomba.** Prosper Mérimée.
El la franca tradukis Prof. J. Beau.
Prezo de ĉiu el la supraj libroj 1ŝ. 6p., afranko 2p.
aŭ 7 internaciaj respondkuponoj.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi.
El la hungara tradukis L. Spierer.
8. **La Virineto en Bluo** kaj aliaj rakontoj.
Originale verkita en Esperanto de Mason Stuttard.
Prezo de ĉiu el la du lastaj libroj 3ŝ., afranko 2p.
aŭ 13 internaciaj respondkuponoj.

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiuj du vortoj.

Mi interŝanĝos 250 pecojn de Aŭstraliaj postmarkoj (10 ekz. de 25 diversaj markoj) kontraŭ 250 pecoj de vialandaj postmarkoj. Sendu viajn postmarkojn per registrita letero. M. C. McKay, Kennedy Street, BOWEN, Queensland, Aŭstralio.

Nekatolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, Loonopzand, Nederlando.

La Gildo de Sankta Ajdan proponas intereson pri arkitekturo kaj kampara beleco, Kristana bonfarado, la antaŭenigo de Esperanto, kaj okazon por interamikigo. Gildestro: Roye England (Del. IEL), Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Brita oficiro deziras korespondi kun geislamanoj. J. Cameron, Lloyds Bank, Wolverhampton, Anglujo.

Eŝua Bohor Koen, Gorna Ĝumaja, pl. Mite Markov 2, Bulgarujo, deziras reprezenti fremdlandajn komercajn kaj industriajn firmojn. Bankreferencoj bonegaj, eventuale bankgarantiaĵoj. Korespondas Esperante.

La "Fulmo" Ĉiamdaŭra Kalendaro estas ĉie en Esperantujo bonvena donaco, ne gravas kiam ajn. 1ŝ. 6p. aŭ frankite: Ingliš, 21 Lynmouth Road, Bristol 2, Anglujo.

Bildkartan vesperon aranĝos Bristola Esperanta Klubo Novembro 21an. Sendu ĉiuspecajn bildkartojn al: F-ino Nina Farley, 32 St. Andrew's Road, Bristol 6, Anglujo. Nepre respondos.

Federacio de Unuigita Junularo, nesekta, nepolitika, terrasa organizaĵo por kunligi junularkondukantojn, forigi militojn, efektiviigi toleremon. Ĉu vi aliĝos? Kotizo dek cendoj. Petu informojn de Kolegio de Unuigita Junularo, Los Gatos, California, Usono.

Volonte mi faros iun ajn peradon aŭ laboron en Hispanujo, akceptante rekompence postmarkojn pligrandigontajn mian kolekton. José Contreras, Andalucia 11, Madrid.

Deziras interŝanĝi postmarkojn kun ĉiuj landoj kontraŭ samvaloraj hispanaj postmarkoj, postkartoj, revuoj, libroj aŭ io alia. S-ro José Contreras, Andalucia 11, Madrid.

Deziras korespondi pri filozofio kun ĉiuj landoj S-ro Mariano Tolosa, Trafalgar 54-2, Barcelona, Hispanujo.

Esperantolingva sonfilmo, normallarga (35mm.), 435 mjn longa estas vendata aŭ interŝanĝata. Interesigintoj turniĝu al D-ro V. Tóth, Budapest III, Jolsva u. 4, Hungarujo.

Biologi-dinamika ĝardenkulturo. Sveda ĝardenisto deziras korespondi kun svisoj kaj aliaj sud-eŭropanoj. Inter alie kun ĝardenistoj kaj se eble kun anoj de la biologi-dinamika kulturmetodo. S-ro Uno Albertson, Rosenholm, Hornslet, Danlando.

Aarhus, Danlando. S-ro L. Moesgaard Larsen, Jaergaardsgade 138: postkartoj ilustritaj, postmarkoj kun ĉiuj landoj.

Ĉeĥoslovaka Esperantista filatelisto deziras interŝanĝi postmarkojn kaj ilustritajn postkartojn kun gesamideanoj en tuta mondo. Certe respondos. Josef Maryška, Vyšeňovice 111, poŝto MOCHOV apud Praha, Ĉeĥoslovakujo.

Kun ĉiuj landoj kaj aparte kun Svisujo deziras korespondi Jan Skalicky, Vejprty 53, Ĉeĥoslovakujo.

Kun ĉiuj landoj kaj aparte kun Svisujo deziras korespondi Jožka Škorpil, Tábor 235, Ĉeĥoslovakujo.

En ĉinujo seriozan korespondant(in)on pri kulturo, vivo, ktp., serĉas S-ro Eduard Tvarožek, profesoro de komerca akademio, Trenčín, Ĉeĥoslovakujo. Certe respondos. Bonvolu diskonigi.

Ĉeĥoslovaka, 34-jara fervojisto alvokas gesamideanojn en ĉiuj mondpartoj korespondadi letere aŭ postkarte pri diversaj temoj. Ĉiam kaj tuj respondos. Boh. Novotny, Hlušovice u Olomouc 48, poŝto Bohunovice, Ĉeĥoslovakujo.

Porinfanaj lernolibroj novaj interŝanĝotaj kun ĉiulandaj elementlernejaj instruist(in)oj. Korespondadoj franclingvaj ricevotaj; sendotaj esperantaj, itallingvaj. Corrado Cerri, Casale Litta, Varese, Italujo.

Intima Rondo serĉas interesajn diskutotajn por siaj kunvenoj. Bonvolu skribi al ni pri aferoj hejmaj, infanedukaj, sociaj politikaj, virinaj, esperantopropagandaj, k.a. Ni diskutos kaj certe respondos. Sendu - al adreso: S-ro Arvid Bern, Bregardsgatan 45, Karlskoga, Svedujo.

Metodi Pančev, Rakovski 108, Sofia, Bulgarujo, interŝanĝas fotajn, kinajn, kaj filatelajn revuojn, jubileajn postmarkojn, kaj Esperantajn kun ĉiuj landoj.

Juna Franco, 21-jara, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Certe respondos. S-ro Marc Hervet, Barrage de Gnioure par Siguer (Ariège), Francujo.

Por mia nova aktuala romano, kiun nun filmigas pola ŝtata filmentrepreno, mi serĉas tradukistojn kaj eldonistojn por ĉiuj lingvoj. Jean Forge-Fethke, Lodz, Stefana Jaracza 17 m.26, Polujo.



Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-ro 10

OKTOBRO, 1946

I.E.L. FERIO-KLUBO

En nia gazeto de Nov.-Dec., 1944, aperis artikolo *La Necese por Ideala Libertempo*, en kiu S-ro P. Ball skribis pri la ebleco aranĝi libertempojn ĉe gesamideanoj en diversaj landoj. Jam antaŭ la milito oni faris provojn aranĝi libertemp-interŝanĝojn inter gesamideanoj, sed post unu-du jaroj ili ĉiufoje fiaskis kaj malaperis. La kaŭzoj? Tio estas simple klarigebla. Tre ofte samideanoj ne agis honeste unuj kontraŭ aliaj! Ekzemple samideano A promesis interŝanĝi libertempon kun samideano B; li iris ĉe S-ro B en unu jaro kaj devus reciproke akcepti S-ron B en la sekvanta jaro. Sed pro diversaj kaŭzoj aŭ pretekstoj li ne tion faris. Povas esti, ke la unua kontakto evidentigis, ke la du havas nenion komunan inter si. Kio ajn estu la vera kaŭzo, tiaj aranĝoj tro ofte donis nur malkontenton, kaj ofte ĉagrenon.

Ni ellaboris planon, kiu kredeble forigos tiujn malfacilaĵojn, kaj ni prezentas al niaj membroj informon pri la I.E.L. Ferio-klubo. Jen la simplaj reguloj:

(1) Nur individuaj membroj de I.E.L. (M.J, MA, MS, k.t.p.) rajtas partopreni.

(2) Tiu, kiu deziras partopreni, devas sendi al I.E.L. unu Internacian Respondekuponon por registri.

(3) Post ricevo, tiu plenas la Registrilon, sur kiu li promesas reciprokan gastigadon de unu samideano, kaj samtempe indikas kiujn landojn li mem deziras viziti, laŭ vico de prefero, kaj aldonas ankaŭ kelkajn detalojn pri si kaj pri siaj deziroj. Poste tiu sendos la Registrilon al la Centra Oficejo de I.E.L., aŭ rekte aŭ pere de Ĉefdelegito aŭ Peranto, kune kun la Registro-pago, 2 Anglaj ŝilingoj (8 rpk.) aŭ ekvivalento.

(4) I.E.L. zorge klasifikos la Registrilon, kaj provos kontaktigi taŭgajn samideanojn laŭ iliaj esprimitaj preferoj.

(5) Kiam tio estas farita, la samideano kiu faros la unuan viziton, informos I.E.L. kaj pagos al ĝi la ekvivalenton de 2 Anglaj pundoj.

(6) Se tiu vizito bone okazos, kaj poste la reciproka vizito okazos, I.E.L. repagos tiun sumon (malpli 10% pro elspezoj).

(7) Tamen, se evidentigos, ke tiu kiu jam ĝuis libertempon, ne volos fari sian parton de la kontrakto, tiu rezignos sian pagon, kiu aŭtomate estos je la dispo de la alia kontraktanto, kaj servos kiel depona pago por tiu lasta rilate libertempon, kiun I.E.L. aranĝos por li.

Sekve, se la kontrakto estos reciproke plenumata, ambaŭ personoj ĝuos libertempon preskaŭ senpage (krom la veturelspezoj kaj personaj elspezoj) kaj espereble tio kondukos al daŭra amikeco. Kontraŭe, se unu ne plenumos sian promeson, li estos ricevinta tre malmultekostan libertempon, sed tamen estos paginta la eventualan libertempon de sia gastiginto.

Ni klarigu per konkreta ekzemplo:

S-ro A. en Britujo kontaktiĝas pere de la Ferio-klubo kun S-ro B. en Svedujo kaj ili interkonsentas reciproke gastigi unu la alian. La aranĝo estas, ke S-ro A. unue iru ĉe S-ro B. Sekve, S-ro A. pagas al I.E.L. 2 pundojn, kiun sumon I.E.L. konservas en speciala kaso. La afero iras glate kaj la sekvantan jaron S-ro B. iras ĉe S-ro A. en Britujo. Ambaŭ estas kontentaj kaj sekve I.E.L. repagos al S-ro A. 2 pundojn minus 10%. Tio estas ekzemplo de normala funkciado.

Sed kio okazos kiam la afero ne bone iras? Ni klarigu: Ni supozu, ke S-ro A. pagis sian deponpagon al I.E.L. kaj feruis en Svedujo. Pro neantaŭvidita cirkonstanco, evidentigis ke li ne povos gastigi S-ron B. laŭ aranĝo. Tiukaze, I.E.L. provos aranĝi, ke S-ro B. vizitu alian Britan samideanon, S-ron C., kaj la deponpago de S-ro B. jam estos pagita de S-ro A. El tio povas rezulti, ke S-ro B. deziros gastigi S-ron C. la sekvantan jaron, kaj el tio povos sekvi daŭra amikeco. Sed se ne, I.E.L. klopodos kontaktigi S-ron C. kun samideano, kiu spertis similan neplenumon de la kontrakto, kaj tie! Ĉiuj ricevos kontentigon. Ni

antaŭvidas, ke pro diversaj kaŭzoj—verŝajne neintencaj—ĉiam estos disponeblaj, pluraj "ekstraj" samideanoj.

Oni bonvole rimarku, ke ĉi tiu plano ne estas funkciigebla ĝis 1947. Ni faras la avizon nun por doni al niaj membroj tempon por pripensi la aferon, kaj por disponi al ni tempon por fari la necesajn ĝustigojn. Kompreneble, membroj povos tuj sin registri por 1947.

C.C.G.

NI ESTU BONAJ KONTRAŬ LA INFANOJ

Antaŭ nelonge dekdujara knabino preteriris fenestron, apud kiu mi sidis. Ŝi tiris post si knabon apenaŭ dujaran. Tamen ne komprenu tiel, ke la infano kontraŭstaris, sed la knabino iris tiel rapide, ke estis malfacilege por la infano ŝin sekvi. Tamen la knabino ne ekrigardis malantaŭen, krom kiam la infaneto faletis, kaj tiam plejparte por riproĉi la etulon. La malgranda infano faris laŭpove ĉion por ne postigi. Ĝia aspekto iel estis tia, ke mi ekmalĝojis. Ĝia deziro por milda afableco kaj persona atento estis klarege evidenta en ĝiaj vizaĝo kaj maniero. Tiu ĉi deziro estis tiel forta, ke la infano estis tute preta por akcepti ion, kiom ajn etan, kion ĝi eventuale povus rigardi kiel montron al tio.

Unufoje la infano ekfalas, sed ĝi troviĝis en ledaj kondukiloj kaj la knabino, malhelpante ĝin kontraŭ falo, senpacience kaj malmilde antaŭ si svingis ĝin. La kompata infano ĉi tion akceptis kiel afablan ludon kaj montris dankan ĝojon. Mi vokis al la knabino kaj ŝajnigis opiniu kiel la infano, laŭdante ŝin pro tio. Mi diris al ŝi, ke per tia ludo ŝi pleje amuzas sin mem. Ĉi tio kaŭzis, ke ŝi komencis svingi ĝin plie en la ledajoj, tamen estis evidente ke en la koro ŝi ne sentis inklinon al tio, sed la malgranda infano estis ĝojega.

Tion ĉi mi rakontas pro tio, ke mi ne malofte vidis belvestitajn patrinojn junajn en la urbaj stratoj simile kondukti kontraŭ siaj infanoj—kaj eĉ pli malbone. Ĉi tiuj malgrandaj kompatinguloj tuŝis mian koron per siaj malĝojaj mienoj. Tre kredeble oni ne pripensas tion, kion ili faras, tiel rifuzante al la etuloj la intimecon, kiun ili tiel forte deziras. Oni ne pripensas, ke tiamaniere oni subpremas virte puran koron kaj daŭre ĉagrenas homon de la estonteco.

*El Islanda lingvo Esperantigis, kun la permeso de la Islanda revuo "Jörd",
Arni Bodvarsson*

LA PETSKRIBO

La cifero daŭre kreskas, kaj la kontribuo de Nederlando—nun ĉe la supro—rimarkinde aldonis al la sumo. Grava faktoro en la laboroj de niaj Nederlandaj samideanoj, estas tio, ke oni sukcesis instigi iun instruistan gazeton repressi la deklaron (kvanto dekmil), kaj ankaŭ redaktoro de ĉiumonata periodaĵo promesis same fari (eldonkvanto 82 mil). La alveno de formuloj eltranĉitaj el gazetoj atestas pri la sukceso de tiu agado. Gratulon.

Ciferoj kontrolitaj ĝis 6a de Sept. :

Landoj

Aŭstralio ..	1635	Kanado ..	190
Aŭstrujo ..	46	Luksemburgo ..	3
Belgujo ..	2944	Maroko ..	947
Brazilo ..	4129	Nederlando ..	23507
Britujo ..	12714	Norvegujo ..	8775
Bulgarujo ..	18064	Nov-Zelando ..	1956
Ĉeĥoslovakujo ..	7999	Palestino ..	387
Egiptujo ..	1243	Polujo ..	10
Finnujo ..	6189	Portugalujo ..	3115
Francujo ..	4590	Sud-Afriko ..	65
Germanujo ..	511	Svedujo ..	15237
Grekujo ..	473	Svisujo ..	910
Hindujo ..	47	Usono ..	3528
Hungarujo ..	2135	Ceteraj lokoj	37
Islando ..	3775		
Italujo ..	847	sumo	131617
Jugoslavujo ..	1795		

Okupoj

Artistoj ..	794	Navigaciistoj	564
Delegitoj		Parlamentanoj	62
Komunumaj	163	Policistoj ..	777
Dentistoj ..	168	Presistoj ..	1326
Desegnistoj ..	754	P.T.T.-istoj ..	2840
Dommastrinoj	19847	Religiistoj ..	506
Edukaj		Sciencistoj ..	524
Aŭtoritatuloj	467	Sindikatejoj	189
Elektristoj ..	1055	Soldatoj ..	1591
Farmacistoj	407	Studentoj ..	10559
Farmistoj ..	5384	Ŝoforoj ..	985
Hotelistoj ..	574	Ŝtatoficistoj ..	2996
Inĝenieroj ..	4582	Tekstistoj ..	690
Instruistoj ..	7509	Transportistoj	6465
Juristoj ..	625	Urboficistoj ..	1338
Jurnalistoj ..	461	Vendistoj ..	3915
Komercistoj ..	22478	Vestistoj ..	1978
Konstruistoj	2609	Diversaj ..	6829
Kuracistoj ..	1818		
Laboristoj ..	8832	sumo	131617
Lingvistoj ..	107		
Metiistoj			
Diversaj ..	8849		

La afero tiel bone sukcesas ke la kosto estos multe pli alta ol ni antaŭvidis. Sekve, donacoj por helpi kovri tiun koston estos tre bonvenaj !

RAPORTOJ PRI LA MOVADO

ĈEĤOSLOVAKUJO

Karakteriza de la movado en Ĉeĥoslovakujo estas la grandega entuziasmo en la nordbohema urbo Doksy ĉe Mácha-lago.

Dum 21a ĝis 31a de Julio oni okazigis en tiu urbo kursojn de Esperanto en kiuj partoprenis 83 personoj. La kursoj estis dividataj en tri gradojn, elementan, progresintan kaj instruistan. La unuan, por komencantoj, oni gvidis laŭ Ĉe-metodo.

Preskaŭ ĉiu studanto alportis donace unu aŭ pli da libroj por la loka biblioteko kaj la oficiala transdono de la libroj okazis la 28an de Julio al invitita reprezentantaro de la urbo. La estraro de Doksy montras simpatian por Esperanto kaj disponigis al nia movado grandan konstruaĵon, estintan hotelon. Post renovigo ĝi portos la nomon *Hotel Esperanto*, kaj espereble la strato en kiu ĝi troviĝas ricevos la nomon Esperanto-strato.

La fotografajo montras la kursfinan grupon.

V. Špur, Ĉeĥoslovakujo

sukcesis interkonsenti kun S-ro Tiberio Morariu, la lastjara favorita instruisto, kaj tiel ni ne restis sen la ĉarmo de lerta eksterlanda instruisto. Aliparte, ŝajnis al ni, ke la morala sukceso estis pli granda ol en la antaŭa jaro.

Ĉeestis du oficialaj reprezentantoj de la Sveda kleriga asocio, el Götetborg kaj Stockholm.

V. Setälä, Finnujo

FRANCUJO

La Internacia Foiro de Marseille okazos en la dua duono de Septembro kaj uzas Esperanton pere de informilo por konigi sin al la internacia publiko. Esperantaj glumarkoj ankaŭ estas uzataj. En la Granda Palaco de la Foiro troviĝas Esperanta stando kaj dum la tuta jaro funkcias Esperanto-fako, kiu sin okupas pri internaciaj rilatoj inter partoprenantoj kaj aĉetantoj. Ĉiuj informoj estas haveblaj de Foire Internationale, (Esperanto-fako), 36 La Canebière, Marseille.



FINNUJO

Duan fojon post la milito Esperanto-Instituto de Finnuno vokis samideanojn al pasigo de komunaj ferioj ĉe lernolibroj kaj sub la verda standardo. Tio okazis en Taipalsaari, la 30an de Junio ĝis 10a de Julio. La nunjara ejo de la kurso estis apud la lago Saimaa en komunumo Taipalsaari, la tiel nomata feria vilaĝo Suur-Saimaa.

La sukceso, se oni ĝin kalkulas laŭ la nombro de partoprenantoj, ne estis tiel granda kiel en Punkaharju. Entute ĉeestis 51 lernantoj, el kiuj 8 Svedoj. Feliĉe ni

HUNGARUJO

La gvidantaro de la Budapeŝta Ĉefurba Fremdultrafika Oficejo kun miro konstatis la vivforton de Esperanto, ricevinte en tiu lingvo petojn el multaj landoj pri la kajero pri ruinigita Budapest. En la nuna momento ili ne povas eldoni ĝin en Esperanto, sed ili sendas ĝin en aliaj lingvoj al la petantoj, kaj decidis respondi al ĉiu en Esperanto. Kiu ankoraŭ ne skribis, petu la kajeron. Adreso: Deák Ferenc-u.2, Budapest V.

La magistrato nomigis malgrandan straton en la VIII-a distrikto de Budapeŝt

Esperanto-strato, la unua en nia lando. Tio antaŭe estis *Kender utca* kaj en ĝi troviĝas la Esperanto-presejo de fakdelegito Sándor Szalay.

En la Fervoja Sindikata Domo apud la Orienta Stacidomo en Budapeŝto estas konstanta Esperanta deĵoro. La Hungaraj fervojoj donis libertempon al fervojisto Ludoviko Korsós, kiu senpaga bileto, por vojaĝi tra la lando kaj propagandi Esperanton ĉe la fervojistaro.

La Hungara radio kelkfoje donis Hungarlingvajn sciigojn pri la movado. Jam multaj eksterlandaj petoj alvenis pri Esperanto, sed ne sufiĉas. Precipe el najbaraj ŝtatoj petu sciigojn en Esperanto, minimume unufoje ĉiusemajne. Adreso: Brúdy Sándor u.7, Budapeŝto VIII.

P.B.


ITALUJO

Esperanto bone penetris en studentajn rondojn en Padova, en kies Universitato troviĝas propra radio-stacio. La Radio-direkcio promesas regulajn dissendojn pri Esperanto en venonta akademia jaro. Ankaŭ en la ĵurnaloj de la Padovaj studentoj aperis artikoloj pri Esperanto. La tre grava Internacia Studenta Asocio, kies ĉefa Itala sidejo estas en Padova, akceptis Esperanton egale kun aliaj lingvoj por siaj internaciaj rilatoj. Oni petas kunlaboron flanke de studentoj kaj profesoroj. Oni skribu al Associazione Studentesca Internazionale "Digamma Pi", Università degli studi, Padova.

B. L. Marini, Trieste

NORVEGUJO

Okaze de la festoj de la Norvega Nacia Tago, 17an de Majo, la grupo en Haugesund aranĝis Esperanto-manifeston per partopreno en procesio. La fotografajo montras la aŭtomobilon ornamitan per butelbrancetoj kaj devizoj kaj kun grupanoj en diversaj naciaj kostumoj.



URUGVAJO

La Unua Nacia Kongreso de Edukado faris deklaron favore al Esperanto post longa diskuto. En la *Boletín de la Federación Uruguaya del Magisterio* de Majo oni dediĉis preskaŭ tutan paĝon al nia afero.

Filatelo

S-ro Vasil Jankoff, Prezidanto de la Bulgara Filatela Societo, estis elektata kiel Prezidanto de la Internacia Filatela Esperanto-Klubo. Tio estas grava antaŭenpaŝo por la enpenetrigo de Esperanto en filatelajn rondojn, ĉar prezidanto de landa filatela societo povas iari utilan propagandon en tre altaj medioj.

Instruistoj

Somera Lernejo de Societo de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj

Dum unu semajno, 3an ĝis 10a de Aŭgusto, geinstruistoj el multaj partoj de Britujo, kaj el multaj diversspecaj lernejoj kunvenis en Heys Farm Gastejo en nord-okcidenta Anglujo por studi, diskuti, aŭskulti prelegojn kaj interparoladi. Entute 44 personoj partoprenis. Tre bonvenaj estis tri Francaj samideanoj, unu el kiuj estis F-ino Jeanne Dedieu, prezidantino de la Franca Esperantista Societo de Geinstruistoj.

Ĉiutage okazis konversaciaj rondoj, lecionoj aŭ prelegoj. Posttagmeze oni faris ekskursojn aŭ pretigis programojn por la vesperoj. La vesperaj kunsidoj havis precipe literaturan karakteron, sed okazis ankaŭ ludoj kaj gajgaj aferoj.

V.C.N.

Ŝoseoj kaj Publikaj Laboroj

Ŝoseoj, pontoj, havenoj k.t.p. estis serioze difektitaj dum la milito, kaj la moderna epoko bezonas elvolviĝon de la publikaj konstrulaboroj, kiuj permesos plibonigi la komunikrimedojn. En tiuj gravaj aferoj Esperanto havas lokon. Geinstruistoj, kiuj havas intereson pri tiuj aferoj, skribu al la Internacia Sekretario pri Ŝoseoj, de ILEPTT, S-ro Broise Auguste, Inĝeniero, Rue Philippière, LONGUE, M. et L. Francujo.

R.F.

Bellamy kaj Esperanto

La jam dum pluraj jaroj ekzistanta Internacia Unuiĝo Bellamy (I.V.B.), kies sidejo estas en Nederlando, ĉiel klopodas efektiviĝi la Bellamy-ekonomion. Por siaj internaciaj rilatoj ĝi ĝis antaŭ nelonge uzis diversajn lingvojn. Spertinte multajn malfacilaĵojn, ĝi fine decidis utiligi Esperanton kaj starigis superan instancon, la Internacia Asocio Bellamy (I.A.B.)

HUNGARUJO

La 18-20 Aŭgusto okazis en urbeto Orosháza la 16a Hungara Landa Kongreso, kiun kune aranĝis la Landa Asocio kaj la Laborista Asocio. El 23 lokoj anoncis sin 148 partoprenantoj. Estis interesa ekspozicio en la Sindikata Domo, kie funkciis aparta poŝtoŝeĉo kun Esperanta stampilo. Okazis du laborkunsidoj kaj festa ferma kunsido, du sukcesaj vesperoj de *Literatura Mondo*, kun partopreno de Baghy, Kalocsay, Tárkony, Bleier, unu liberaera prezentado, kaj komunaj ekskursoj. Oni akceptis kun granda ĝojo la salutojn de la Bulgara kaj Nederlanda Esp. Asocioj, kiel ankaŭ la saluton de IEL, kaj la informon pri la ebla unuiĝo de IEL kun UEA. Oni aŭdis raporton de instruisto Benkó pri enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj akceptis tiurilatajn deziresprimojn. La ĉefa deziresprimado estis prepari la unuiĝon de la Hungaraj Esp. Societoj.

La kunsido de la delegitoj kaj membroj de IEL dum la Kongreso kun amo salutas la centron de la Ligo kaj ĉiujn delegitojn pro la okazo ke la libera demokrata Hungarujo denove kontaktiĝis kun la mondorganizo, kaj dankas plej kore al ĉiuj eksterlandaj amikoj, kiuj per siaj agoj donacis al parto de la Hungara Esperantistaro la membrecon de IEL por 1946.

P.B.

NEDERLANDO

El Nederlando ni ricevis interesajn informojn, kun urbplanoj, pri bombardita kaj rekonstruota Rotterdamo. Klarigoj en Esperanto. Oni sin turnu al F. de Vries, Postbus 8002, Amsterdam-W.

Vojaĝanta Esperantist-Gimnastikisto

Atentu viziton en via loko de Dana gimnastikisttrupo de Kr. Krogske, kaj salutu la plej lertan el ili, S-ron Jens Welling, ĉar li estas Esperantisto.

Ili vizitos Norvegujon de 30 de Julio ĝis 13a de Sept. Post tio ili iros en Anglujon, Nederlandon, Belgujon, Francujon kaj Svisujon.

J. Bendtsen, Danujo

ESPERANTA SINJORINA ĤORO

La 24an de Junio okazis *Intima Muzik-vespero* en la Hago sub la gvido de nia samideano Henk Valckenier. Kun entuziasmo kantis la ĥoro *La Nova Mondo*. La sukceso estis tiom granda, ke 6 sinjorinoj el la publiko tuj aniĝis! Fama Haga kantisto René Frank kantis plurajn kantojn el kiuj unu estis Esperantlingva. La muziksalono estis tute plena kaj *La Nova Mondo* faris bonegan reklamon por nia bela lingvo.



ALEKSANDER SILBERNIK



A. Silbernik, la bopatro de D-ro L. L. Zamenhof, estis la plej meritplena helpanto de nia Majstro dum multaj jaroj komence de la naskiĝo de Esperanto. Estas kurioze, ke li estas tre malmulte konata en Esperantistaj rondoj. La biografistoj de Zamenhof skribis pri li nur malmultajn vortojn. La Enciklopedio de Esperanto dediĉis al li nur kelke da linioj. Nin atentigis pri la multegaj servoj de Silbernik al lia bofilo, la artikolo de D-ro Leono Zamenhof, la frato de la Majstro, kiu aperis en la revuo *Universo* en 1911. Ĝi menciis faktojn pri la dorna vojo de la kreinto de Esperanto, kiuj ne estas menciitaj eĉ en la bonega libro de E. Privat, *La Vivo de Zamenhof*. La unua lernolibro de D-ro Esperanto estis preskaŭ preta en la jaro 1885, kiam Zamenhof diplomigis en la Universitato en Varsovio, kie Doktoro de Medicino. Du jarojn li vane serĉis eldonistojn por tiu ĉi libro. La patro de Zamenhof ne estis favora al la lingvaj eltrovaĵoj de sia filo, sed tiu perfektigis ĝin dum sia kvarjara studado en la Varsovia Universitato.

Zamenhof dediĉis sin al la okulkuracado, laboris duonon de jaro en la hebrea mal-sanulejo en Varsovio, kaj ankoraŭ duonon de jaro en la urbo Plock. Dum kelke da monatoj li studis en sia fako en Vieno. Kiam li revenis Varsoviajn, li komencis sian praktikon, aŭtunon 1886, en la loĝejo de siaj gepatroj (Muranovska 40) kaj poste li transloĝigis en la straton Przejezd 9.

Venis la naskiĝjaro de Esperanto. La 30an de Marto 1887, Zamenhof fianĉigis

kun la filino, Klara, de Aleksander Silbernik el Kovno. Post ricevo de cenzura permeso 14-7-1887, oni tuj presigis la du Esperantajn lernolibrojn, unu Ruslingve kaj unu Pollingve. La 9an de Aŭgusto 1887 li edziĝis; en junio 1888 naskiĝis lia filo Adam kaj unu jaron poste lia filino Sofie.

Intertempe la ricevita doto de Silbernik (10,000 rubloj) disfandiĝis pro la elspezoj de la presado de la Esperanto-libroj, anoncoj en diversaj gazetoj kaj senpaga dissendo de la libroj al diversaj gazetoj, asocioj kaj lernejoj. Sed Aleksander Silbernik ĉiam helpis al sia bofilo malavare kaj tre favore, ĉar li ekkonis la internan ideon de Esperanto, fariĝis mem fervora Esperantisto kaj interkorespondis ofte kun alilandaj samideanoj.

Zamenhof tamen ne volis misuzi sian bopatron. Kiam li ekvidis, ke en Varsovio li ne povas gajni la necesajn vivrimedojn por sia familio, li sendis siajn edzinojn kaj filon al siaj gepatroj, la familio Silbernik, en Kovno, kaj li mem vojaĝis en aŭtuno 1889 al sia naskiĝurbo Pjalistok. Tie oni senkaŝe sciigis lin, ke la civitanoj jam scias pri lia fervora laboro por Esperanto, kaj tial ili ne fidas al kuracisto, kiu sin okupas pri flankaj aferoj.

De iu konato Zamenhof eksciis, ke en la urbo Herson oni bezonas okuliston. Li vojaĝis tien, kaj post kelke da monatoj de suferado pro malsato kaj malvarmo, Silbernik denove helpis al li reveni Varsoviajn.

En Majo 1890 Zamenhof denove komencis tie sian okulistan praktikon en la strato Novolipki 21. Tio daŭris nur tri jarojn. Kvankam li havis, krom sia praktiko, ankaŭ malgrandan enspezon de 50 rubloj ĉiumonate por la redaktado de la gazeto *Esperantisto*, kiu aperis en Nürnberg, li ne gajnis sufiĉe da vivrimedoj, kaj ĉiam estis helpata de Silbernik.

La 27an de Novembro 1893 Zamenhof denove forlasis Varsoviajn, kaj transloĝigis kun sia familio al la urbo Grodno, kie li daŭrigis sian okulistan praktikon dum proksimume 4 jaroj. Kiam en Grodno dua okulisto starigis praktikon, Zamenhof ne volis, aŭ ne sciis, konkuri kun li, kaj Silbernik helpis al sia bofilo denove transloĝigi Varsoviajn.

La enspezoj de Esperanto malgrandiĝis, sekve de la malpermeso de la gazeto *Esperantisto* en Rusujo, pro la aperintaj artikoloj de Tolstoj. La *Biblioteko de Esperanto* ne havis sufiĉe da abonantoj por kovri la elspezojn. Tial Zamenhof esprimis la intencon interrompi siajn Esperantajn laborojn dum kelke da jaroj.

En Aŭgusto, 1897, Zamenhof vojaĝis Vienon por konatiĝi kun la nova okulista scienco, kaj en Novembro de la sama jaro li aranĝis sian loĝejon kaj laborejon en la laborista kvartalo de Varsovio, strato Dzika 9. La malriĉaj klientoj ekkonis la bonkorecon de la doktoro, kiu ofte kuracis senpage. Lia laborejo pli kaj pli pleniĝis de laboristoj. Fine en la jaro 1903 liaj enspezoj kaj elspezoj atingis ekvilibron kaj kun granda ĝojo li povis anonci al sia bopatro, ke li jam ne bezonas lian subtenon.

Ni vidas, ke la apero de la unuaj Esperantaj lernolibroj de Zamenhof kaj lia cetera senlaca laboro por la disvastigo de la internacia lingvo, estis ebligita nur danke al la malavara kaj favora subteno de Aleksander Silbernik dum 16 jaroj seninterrompe! Sen tiu ĉi helpo la provo de Zamenhof sendube estus malaperinta, kiel malaperis la kelkcent similaj provoj je kreo de internacia lingvo. Zamenhof mem ne estis praktika homo, kaj li trovis en Silbernik tre praktikan kaj sindonan helpanton por la efektivigo de siaj noblaj kaj homamaj ideoj.

N. B. *Hawkin, Palestino*

(La kliŝon afable disponigis al ni la redaktorino de *La Familia Rondo*, Britujo).

HUNGARA AGADO DUM LA NACIISTA REGADO

Oni scias, ke kelkaj hungaraj Esperantistoj laboris dum la milito kaj la naciisma regado ĝis la lasta ebleco, kaj tio vekis kelkloke la impreson, ke ili akceptis la ideojn de la regado. Mi, kiel objektiva rigardanto de la aferoj, kiu mem trovis oportune dum la militaj jaroj abdikii la ĉefdelegitecon, devas deklari, ke tiu aserto ne estas vera kaj krom malmultaj esceptoj la Esperantistaro hungara restis fidela al la idealoj. Kelkaj gvidantoj, por savi la movadon kaj ebligi almenaŭ laŭpaperan ekziston de la societoj, kelkfoje iomete ŝajne cedis al la ordonoj kaj deziroj, sed interne de la societoj neniam regis la naciistaj reguloj.

Mi devas menci, ke Prof. Kökeny en sia stenografia lernejo kunvokis "Giesswein-Literaturan Rondon" (nomitan laŭ la unua prezidanto de H.E.S., kaj konata parlamentano) kaj en ĝi regule kunvenis 10-25 personoj, kiuj aŭskultis pure literaturajn, sed vere Esperantismajn paroladojn kaj laŭtlegeadojn, kaj oni akceptis alilandajn gastojn.

Ankaŭ la katolikaj kaj protestantaj societoj ofte kunvenis ĝis printempo 1944, kaj eĉ okazis regulaj katolikaj mesoj kun predikoj vere Esperantismaj.

Efektive nur la socialista laborista movado estis malebligata, kio dolorigis ĉiun sinceran Esperantiston, ne nur tiujn kiuj estis membroj de tiu movado.

La hungara gazeto povis kvaronjare aperi kun registara subvencio, sed domaĝe ĝi tial devis ofte publikigi ties oficialajn tekstojn. Tio estis la sola makulo. Sed aliparte, Prof. Miĥalik en la kadro de federacio ebligis al ĉesigita juda skoltgrupo, ke tiu sub nomo de junulara sekcio de H.E.F. povu daŭrigi la laboron ĝis printempo 1944.

Do, la Esperantistoj, ofte luktante kontraŭ malhelpoj kaj spitante regantajn ideojn, tenis la ŝipon super akvo. Antaŭ la invado de la Germanoj, 12an de Marto 1944, okazis literatura festo honore al 75-jara pioniro Leono Lóránd.

P. B.

HISTORIAJ INFORMOJ PER ESPERANTO

En multaj landoj oni antaŭe havis la kutimon ornamii la fasadon de sia domo per speciale skulptita *fasadŝtono*, kies ĉizita bildo—ĉu kun teksto, ĉu ne—ofte karakterizis la familion kiu enloĝis la domon. La plej fama kaj plej vaste konata estas la ruĝa ŝildo de la riĉega familio Rothschild en Frankfurt.

Ĉe butikistoj kaj aliaj elpendis precipe ekster la butikoj ŝildoj aŭ tabuloj, ĉu el ligno, ĉu el metalo, kiuj prezentis bildojn karakterizajn.

S-ro H. W. Alings en Nederlando sin okupas pri grava verko en Esperanto pri tiu fako kaj petas ĉiujn rilatajn informojn. Jen la detaloj de lia peto:

1. Ĉu en via loko (aŭ en aliaj lokoj, kiujn vi konas) troviĝas tiaj fasadŝtonoj aŭ elpendaĵoj? Se jes aldonu stratnomon kaj numeron de la domo.

2. Kion ili prezentas?

3. Ĉu estas aldonita in teksto aŭ ĉu ili surhavas nur karakterizajn tekstojn aŭ nomon? Se jardo troviĝas, nepre sciigu.

4. Aldonu, ĉu la fasadŝtono estas rektangula aŭ kvadrata, ĉu ornamita, ĉu kolorigita.

5. La tekston precize citu kaj aldonu tradukon Esperantlingvan.

6. Kiam oni scias sciindaĵojn pri la objekto aŭ pri la domo, en kies fasado ĝi troviĝas, bonvolu aldoni.

7. Kiam oni povos akiri fotografajon aŭ bildon pri la objekto, aŭ gazetartikolon (eventuale prunte, nepre mi resendos) tiam oni faros al mi gravan servon.

Oni sin turnu al H. W. Alings, Middenweg 226, Amsterdam-O, Nederlando.

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	19.00–19.30	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 25.34m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	15.10–15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanta Programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je 16a de septembro.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Mardo	17.50	Sofia (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radiostacio, Moravska Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	15.10–15.30	Sveda Radio. 19.80m. Esperanto-programo. Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm. Nur je la 16a de oktobro (ankaŭ je vendredo la 15a de novembro).
	16.20–16.30	Hradec Králové-Pardubice (Ĉeĥoslovakujo). 280m. Esperanto-programo. Východočesky vysílač (Orientbohema radiostacio), Hradec Králové.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	01.00–01.30	Sveda Radio. 31.46m. kaj 49.46m. Ripeto de la merkreda programo por ekster-Eŭropaj landoj. Nur je la 17a de oktobro (ankaŭ je sabato la 16a de novembro).
	18.05	Bern (Svisujo). 47.28m. Federalismo kaj Paco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.50–21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S. Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluaj detaloj mankas.
	17.50	Sofia. (Bulgarujo). 32.5m. Prelegoj. Radio Sofia.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.30–20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
	20.50–21.00	Moravska Ostrava. 325.4m. (kiel je mardo).
Sabato	16.30–16.45	Wien (Aŭstrujo). Kurso kaj informo.
	18.30–18.45(?)3	SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato.
	19.00–19.45(?)PRA 2	(Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	19.00–19.30	Praha. 25.34m. (kiel je dimanĉo).
	20.00–20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon, sed notu ke pro la fino de somera tempo oni eble ŝanĝas la horojn de la elsendoj je unu horo. Ni urĝe petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuletterojn kaj informojn pri ricevado.

LA LEĜANTO PAROLAS

R. Rosetti, *Anĝelujo*, skribas: Kontraŭ la furoro de la ĉenletero (kies reapero ŝvelas kun minaco kontraŭ ĉies paco) vi dekretis saĝe, firme kaj kuraĝe. Kreskas tiu plago, ja de tag' al tago. Novaj naŭvuloj ĉiutage venas. Kiel neĝobuloj kreskas la postuloj—ĉiun ili ĝenas!

Sub magia la promes', ke plenumo de l' formulo portos 256 kartojn al la feliĉulo—ĉiu ĉenleteradepto ĉasis tuj adresokvaron por plenumo de l' recepto, por rikolti la kartaron!

Pro ilia plag' terura, neniu estas jam sekura, kies adreso aperis en preso! Jam tia afero estas danĝero; se iu ĝin riskas, la nomon konfiskas la svarm' sangavida, lokusta, senbrida, de Hunoj, paganoj—la ĉenleteranoj!

Ĉi-svarmo Moskita, ĉi-ar' parazita marodas filistre kaj ĉien vastiĝas, por ili nutraĵo neniam sufiĉas! Sub sprono de l' revo pri granda ricevo, ili sin pelas kaj ŝvelas ĝis krevo!

La afer' ne havas sencon, kaj mi perdas paciencon. For la plu-disvolvon! Pistu en la polvon, knedu en la teron ĉiun ĉenleteron! Al ĉi-fungo, ekzantemo, tiu pesto, anatemo, mi respondas sen kompatato, laŭ E.I. iniciato:

Post Ricevo de la Oka Ĉenletero.

Ĉiu ĉenletero
Iru al infero!
Ili min provokas,
Ilin mi sufokas.
Mi toleris sate!
Foje mi kompatate
Ĝin kopiis orde,
Sed de tiam horde
Svarme ili venas,
Ili min venenas!
Do mi diris krude:
"Jam ne plu vi trude
Tempon mian uzos;
Mi vin forrifuzos!
En rubujon ĵetos
En la koton tretos.
Mortu sen espero,
Teda ĝen-letero!"

PROPRAJ NOMOJ EN ESPERANTO?

Mi estas Esperantisto jam de mia lernanteco. La 1900an jaron ni la unuaj Esperantistoj ricevis la unuajn adresarojn de la Esperantistoj, sendatajn al ni el Varsovio propramane de la aŭtoro de Esperanto.

De tiam mi ĉiam amas okupadi min pri tiu gracia lingvo por la homaro kaj utiligi

ĝin, sed eĉ ĝis nun mi ne povas kompreni, kial oni tenas ĝin en neklareco, dum ĝi devas esti la plej klara lingvo.

Mi deziras aludi pri la propraj substantivoj (la nomoj de personoj, urboj, k.t.p.) se ili estas de latinalfabetaj lingvoj. Kial estas tiu mallklareco, ke ili en Esperanta teksto estas skribataj en nacia ortografio? Kiel legi ilin, se oni ne konas la respektivajn lingvojn? Per tio la latinalfabetaj popoloj kvazaŭ diras al la alialfabetaj, "Vi lernu la internacian lingvon Esperanto, sed vi devas koni ankaŭ ĉiujn naciajn lingvojn."

La neoportuneco estas, ke la ortografioj de multaj latinalfabetaj lingvoj estas neliterpreciza, aŭ, kiel sprite diras la bulgara verkisto Aléko Konstantinov, "tie oni skribas *gumo* sed legas *ĝin gutaperko*."

Due, necerta estas la akcento de la vorto. Ekzemple mi legis librojn de nia samideano Julio Baghy, sed ĝis nun mi ne scias, ĉu Băgi, Baĝi, Băgi aŭ Baĝf estas tiu nomo, ĉar mi ne konas la hungaran lingvon.

Ne mia opinio, sed neceso estas, ke por forigi tiun neklarecon en la klara lingvo Esperanto, oni ĉiam skribu la proprajn substantivojn kiel ili estas elparolataj en la lingvoj el kiuj ili estas prenitaj, sed ĉiam Esperantlitere, metante akcenton super la respektivan vokalon. La mankantajn en Esperanto sonojn oni anstataŭigu per proksimumaj Esperantaj literoj.

Alie ni propagandas internacian lingvon, sed ĝi restos miksisita kun naciaj lingvoj, sekve neklara.

G. Hristov, *Bulgarujo*

(La danĝero en la ĉi-supra konsilo kuŝas en tio, ke se oni skribas ekzemple *Marsej*, aŭ *Rube* oni ne rekonas *Marseille* kaj *Roubaix*. Se necese oni povas indiki la elparolon en krampoj, ekz. *Shakespeare* (*Schspir*).

VENIS VINTRO

Sur branĉeto la paser'
pepas la malĝojon;
venis vintro kaj neĝer'
falas sur la vojon.

Kaj sur la malvarma ter'
marŝas per bastono
lama ĝema la Mizer'
spektro el ĉifono.

Venis vintro kaj sufer'
kiun ĝi alportas;
sur dornaĵo seka ber'
forĝesita mortas.

Lucien Thévenin, *Francujo*

FRAGMENTO EL JUGOSLAVA PARTIZANA BATALO

La fortikajo, Klis, konstruita en la mezepoko, kiu grandegas super la abrupta rifo kaj super la haveno kaj la tuta apudmara regiono, troviĝas en la manoj de niaj malamikoj, kaj tio malebligas la restadon de niaj pligrandaj militistaj trupoj en tiu teritorio.

La unua Dalmacia impeta brigado sieĝas la fortikajon kaj faras ekstremajn penadojn por disrompi la reziston de la malamiko kaj por nenigi la lastan neston de la Germanaj okupantoj kaj de iliaj hejmaj helpantoj. Mankas al la malamiko akvo kaj nutraĵo, sed malgraŭ tio li montras fortegan reziston. Ni rigardas kiel nutraĵo malleviĝas per paraŝuto al la malamiko, kaj unu tuta bovo elfalas kaj alteriĝas inter niaj vicoj. La fortikajo estas nealirebla, kaj ne eblas eĉ alproksimiĝi piede; kaj pezan artilerion, kiu povus detruiri tutan monton el ŝtono, ni kompreneble ne posedas.

Dum ripozo inter la sennombraj *štuka-aviadilatakoj*, niaj kamaradoj rigardas la belegan marbordon, kiu sterniĝas malsupre de ili, kaj ili pripensas la neimageblajn kruelaĵojn, kiujn iliaj gepatroj kaj infanoj suferos, se Klis ne estos konkerita, kaj se niaj aliancanoj ne liveros al ni artilerion kaj aliajn batalilojn por repuŝi la malamikan bandon. Ĉio, kion niaj okuloj vidas tie malsupre, estas liberigita de niaj herooj batalantoj. Ne estas imageble, ke niaj grandaj penoj konkeri la belegajn insulojn kaj la tutan mezdalmacian marbordon restu vanaj.

En nia fantazio ni vidas la alvenon de la ŝipoj de niaj amikoj, kiuj venas por helpi nin. Aŭdante la maŝinzamadon de Germanaj *štuka-aviadiloj*, ni jam imagas, ke al ni venas la flugantaj herooj de niaj aliancanoj. Stimulate de tiuj esperoj, ni faras ĉion eblan por elteni kiel eble plej longe. Terura, kruela, neegala kaj vana batalo daŭras tri semajnojn. La helpo ne alvenas. La malamiko ekkuntiras sian feran prenilon ĉirkaŭ nin. Per ĉiuj ŝoseoj li alproksimiĝas per siaj motorigitaj fortoj.

Ordonon de nia stabo laŭtas: retiriĝo. Tio signifas retiriĝon sub neimageblaj kondiĉoj, de unu montaro al alia, ĉiam sekvata kaj persekutata de la malamiko kaj liaj aviadiloj. Por konservi sin de tiuj abomenaj birdoj kaj iliaj diablaj maŝin-pafiloj, la partizano lerte moviĝas nokte. Sed nun ni ne havas tempon, ni devas marŝi tage kaj nokte. Ni devas batalante eliri el la prenilo.

Nia celo estas transiri la montaron Svilaja, perforte trapasi la riveron Zrmanje, atingi la altan montaron Dinara kaj je tiuj niajn fortojn en Bosnion. La malamiko ne ĉie disponas motorigitajn fortojn. Se li kolektiĝis por forpreni de ni nian karan Split kaj havenon, tio signifas, ke ni devos nin ĵeti post lian dorson kaj ataki Bosnion. Ni postlasas sur la tereno malgrandajn partizanajn taĉmentojn, kiuj sufiĉas por senĉese ĝeni la malamikon. En tiu senĉesa moviĝado kaj neatendita atako de malpli fortaj apartaĵoj konsistas la partizana taktiko, kiu ĉiufoje evitas batalon kun tro forta malamiko.

Ni sukcesis plenumi nian taskon, sed sub kondiĉoj, kiujn povas kompreni nur partizano. Du noktojn sur pinto de Svilaja ŝajnis al mi kvazaŭ infero de Dante. Tero kaj ĉielo kuniĝis kontraŭ ni: tondrado, fulmado, pluvego, haŭbizoj, bombetojloj, *četniki* (kunlaborantoj kun Germanoj) en danĝera proksimeco. Tamen, kiel kutime, la partizano havis feliĉon.

Mi estis kuracisto de la brigada hospitalo. Ni mem portis niajn vunditojn sur vojoj kiuj neniam estis vojoj, eĉ por kaprinoj. Survoje pereis ĉevaloj, sed eltenis homoj. Partizano ja povas elteni teruran suferadon.

Unu bosnia brigado forpelis la *četniki* de Zrmanja valo kaj ni feliĉe transiris la riveron. Ĉe ne unu vunditon ni postlasis. Ni jam eliris el la ringego kaj antaŭ ni troviĝis facila vojo, kvankam leviĝis antaŭ ni masivmontaro Dinara.

Novaj vilaĝoj kaj urboj baldaŭ estos liberigitaj. Por la malamiko ni estis tute perditaj. Li ne sciis, kie ni troviĝas. Ĉe Livno ni atakis per artilerio kaj tankoj. De kie oni havigis tiujn modernajn armilojn? Ni ja perdis survoje preskaŭ la lastan ĉevalon. Tio estas unu el la nekompreneblaj mirakloj de partizana militado.

Jen Livno, Glamoĉ kaj tute okcidenta Bosnio troviĝis en niaj manoj. Jen la vilaĝanoj, infanoj, kiuj ĝoje kriis: *venadas la niaj* . . . kaj kantis partizanajn kantojn.

D-ro V. Jovanović, Jugoslaviujo

MUZIKA TERMINARO

M. C. Butler kaj F. Merrick

Prezo 9 p. aŭ

3 int. respondkuponoj.

Mendu ĉe I.E.L.

HINDUJO

La grandega plimulto de la Hinduoj—ĉirkaŭ 350 el la 390 milionoj—vivas en vilaĝoj, kie ne kreskas rozoj ĉirkaŭ la pordo de iliaj argilaj dometoj. Dum ses monatoj de la jaro ili kuŝas sen okupo en la ombro por eviti la sunbrilegon, kiu forrostaras ĉiun vivon de la lando. Gradon post grado, kiam industrialismo progresas, kaj la transporto plietendiĝas, la vilaĝanoj migras en la urbojn. Tie sub la ombro de la grandaj palacoj, reĝaj kinejoj, kaj registaraj oficejdomoj, ili serĉas la bonŝancon aŭ, dum tempo de malsato, panerojn kiuj povos defali de la tabloj de la riĉuloj. Oni ne bezonas diri, ke la bonŝanco venas nur al malmultaj.

La plimulto pasigas la vivon kun ne pli da posedaĵo ol *dhoti* (lumbotuko), kaj kun neniu lito krom la stratkanaletoj. Ili sidas en vicoj laŭlonge de la pavimo, kaj kiel la malriĉuloj ĉie, ĉi tiuj stratkanaletuloj lernas helpi al si, kiel ankaŭ al unu la alian. Ĉiam ekzistas tie la primitivaj hombezoj de lavado, purigado, kuirado, kuracado kaj komfortigo, kaj tie ili trovas kontentigon. En la stratkanaletoj du-tri pecoj povas esti tre utile uzataj.

Transe kaj supere de ĉi tiu nivelo, troviĝas la periferioj de la mondo de riĉeco—la purigado de la stratoj, servistaj laboroj en la hoteloj kaj restoracioj, strangaj transportokupoj, per mano aŭ per puŝveturiloj, la izolita ebleco de labortrovo en la elvolviĝanta mondo de kinejoj kaj radio, kaj precipe, kiam tie troviĝas Usonanoj, la ĉiesta ŝupolurado.

Eble la plej interesa inter la urbaj malriĉuloj estas la *mirasi*. Lia okupo estas nedeterminita, sed ĝi baziĝas sur la duoblaj funkcioj de muziko kaj masaĝo. La *mirasi* estas fakte komedianto, histriono, kiu posedas aŭ kredas, ke li posedas, gradon de lerteco en kantado, pozado, kaj ludo de unu el la plej strangaj kaj diversaj muzikaj instrumentoj de Hindujo. Frontas al *mirasi* malferma pordo al sukceso, kaj ĉar kiu ajn publika prezentado kiel muzikisto aŭ aktoro estas evitata (kvankam nun pli malofte) de la riĉaj klasoj, li ne devas timi multan konkurencon sur tiu kampo, kiun la radio kaj kinejo rapide plivastigas. Sed, se la tempoj aŭ lia lerteco estas malbonaj, li devas returni sin al masaĝo, tiu panaceo ŝatata de ĉiuj Hinduoj kaj ŝajne en ĉies repertuaro. Ĝi kostas preskaŭ nenion.

Lavado, se oni vivas sur la strato, estas malfacila afero, tamen estus impertinente aserti, ke la malriĉaj urbanoj de Hindujo estas malpuraj, aŭ ĉu ni diru, malpli puraj ol la malriĉa urbano de la Okcidento.

Hindoj multe lavas sin; kaj suno kaj religio postulas tion. Ili povas lavi sin laŭ perfekta kaj enviinda maniero sub la nura kranfluento, aŭ per akvo versata sur la kapon el ladskatolo. Hindu malŝatas (kaj opinias malpura) nian okcidentan kutimon sidi en la akvo, kiu nin lavas. Por li akvo devas ĉiam flui trans la korpon. Koncerne lavinstitucion, tio estas kompare simpla afero, kiam la tuta vestaro konsistas el nur unu longa peco de ŝtofo.

Aparte de tio, la higieno en la dormejoj de la stratoj estas apenaŭ kontentiga, kaj la fatala ĝermo de ĥolero povas embuski en la senkulpa laktuko aŭ melono, kiun neprudenta Eŭropano (aŭ lia indifera servisto) eble aĉetas tie.

Razado estas tumulta komercado. La ordinara Hinduo, malgraŭ ke li estas malriĉa, tamen ne turmentas sin per ĝi. Eble li ne volas esti turmentata, aŭ povas esti, ke li ne povas aĉeti la necesajn ilojn. Estu kiel ajn, li iras ĉe la barbiro. La Hinduo razisto ne uzas sapon, kaj sendube kiel ĉiuj razistoj en la mondo, li estas bonega klaĉulo. Ankaŭ la skribistoj, kiuj skribas leterojn por la analfabetoj, fartas sufiĉe bone. Tie la vendo de la *neem* arbobranĉoj estas tre vigla. Tiuj, kiam fenditaj je la fino, formas specon de primitiva broso, kaj ŝajnas, se ni juĝas laŭ la Hinduoj dentoj, ke ĝi estas pli efika ol la okcidenta modelo. Kaj se oni estas sufiĉe feliĉa posedi malbonan korpoparton aŭ malbelan nevidpovan okulon, la almozpedito estas iom kontentiga.

Rilate medicinon, tio estas delikata afero. Hindujo, malgraŭ ke ĝi havas multajn—sed ne sufiĉajn—okcidente kvalifikitajn kuracistojn, havas sian propran sistemon de kuracado. Por Eŭropa okulo, tio povas aspekti tro multe kiel malpuro kaj magio. Tamen estas tre eble, ke la Hinduoj scias pli multe ol ni pri la valoro de herboj, kaj aparte de opio. Cetere, en la Oriento, kiel ankaŭ en la Okcidento, la kredo estas sendube la plej potenca kuracilo. Kaj se la kredo malsukcesas, ĉiam ekzistas kiel lasta konsultato la *Saddhu* aŭ Sankta Viro aŭ, por ĉi tiu afero, la sankta virbovo, kiu dekorite per turkisa ĉirkaŭkolo, vagas tra la stratoj kaj sin trudas sen malhelpo en kiun ajn budon, kiu plaĉas al ĝi. Kaj super la tuta ĉi tiu fekunda tumulto prezidas la Hinduo policisto, laŭ Brita maniero instruita kaj kompetenta en sia laboro.

Ne mirinde estas, ke en ĉi tiu tumulto de senhavuloj, ribelo povas ekkomenciĝi pro nenio, aŭ povas esti ekspluatata por politikaj celoj. La vivo en la stratoj estas neestingebla kaj monotona. Oni

neniom perdas per ribelo kaj oni povas havi iom da amuzo. Bruligado aŭ rabado eĉ povas alporti iom da gajno; kaj malliberejo, se oni vivas en la strato, ne timigas la plimulton.

Tial, ĉiu registaro havas, kaj versaĵne havos, malfacilan taskon pri la urbaj malriĉuloj. Ĝis tiu tempo, kiam substanco de edukado kaj sekureco povas esti donata al ili, kaj pli malpli sekura niĉo en la socio al ili certigata, la semo de malpaco ĉiam alestos en ĉi tiu fekunda tero.

Tamen, kiel la plimulto de Hindoj, ili estas ĝenerale cedemaj kaj ĝentilaj homoj, kiuj povas rideti en la stratkanaletoj, kaj eble sub propra registaro ili estus pretaj akcepti la ediktojn, kiujn ilia propra antikva imperiestro Asoka disdonis antaŭ 2200 jaroj en Hindujo, kaj inter kiuj li skribis: "Amo estas gajnata per moralaj konkeroj! Por tiu celo ĉi tiu religia edikto estas verkita, ke miaj filoj kaj pranepoj ne kreu, ke novaj konkeroj estas necesaj por gustumiĝi al ili toleremon kaj mildecon de puno, kaj ke ili akceptu kiel konkeron nur tion, kio estas morala konkero." Tio cetere ne estas malatentinda devizo por la hodiaŭa mondo.

Kiel Eŭropo, Hindujo kun sia multlingveco estas antaŭdestinita por la propagando de Esperanto. Kvankam la Hindustana kaj Angla lingvoj tie jam plenumas la servon de helplingvoj, Esperanto havos sufiĉe da ŝancoj kiam oni povos disvastigi ĝin per Hindlingvaj propagandiloj. Dum longa tempo ankoraŭ Hindujo estos malfacila, sed tre taŭga, teritorio por nia laboro.

D-ro A. Mildawurf, Aŭstrujo

AŬTUNA TAGO

De l' folio morta,
kiun vento puŝas,
sur la grundo korta,
la kadavro kuŝas.

Venis la sezono
kiam velkas ĉio;
tiel anemono,
kiel kamelio.

De l' sovaĝa rozo
falas la petaloj.
Kie sen ripozo
kantis najtingaloj,

pendas ruĝaj beroj;
kaj sur muta stepo
kantas nur paseroj
per timema pepo.

Sur la grundo korta,
la kadavro kuŝas
de l' folio morta,
kiun vento puŝas.

Lucien Thévenin, Francujo

INTERNACIA AMIKECO-LIGO

Ferioj por internacia amikiĝado en Nederlando, Danujo, Francujo, Irlando kaj Svisujo estas denove aranĝataj de Internacia Amikeco-Ligo (International Friendship League). Ankaŭ ekzistas agado en pluraj aliaj landoj. La brita filio de I.F.L. estas entrepreno de I.E.L.

I.F.L. estis fondita de brita Kvakero en 1931 kun la celo ebligi al ĉiuj, sed precipe al neriĉuloj, fari vizitojn al aliaj landoj kaj tiel kontribui al internacia amikeco. Filioj, kun edukaj kaj sociaj funkcioj, sekvis. Dum 1939 pli ol 4000 personoj vizitis 52 ferio-centrojn en 13 landoj sub la aŭspicioj de la Ligo. Internacia komitato kunligas la laboron de la landaj filioj. Ekster Britujo la plej aktiva filio estas en Nederlando. Oni ankaŭ subtenas individuan korespondadon pere de Korespondada Fako.

La aĝo de la plimulto de la membroj estas inter 16-30 jaroj, ĉar la organizaĵo celas servi precipe al gejunuloj kun modestaj rimedoj, sed ne ekzistas ekskluziviga aĝlimo kaj pliaĝuloj povas aliĝi.

Gesamideanoj kiuj interesiĝas, kaj antaŭaj membroj, estas kore invitataj kontakti siajn respektivajn landajn filiojn per la sekvantaj adresoj:

Britujo: S-ro J. Hartley, 33 Gordon Square, London, W.C.1.

Francujo: F-ino R. Velay, 1 rue du Debarcadere, Paris XVII.

Belgujo: F-ino L. Cokelbergh, 97 rue Joseph Brand, Schaerbeck, Brusel 3.

Danujo: F-ino B. H. Hansen, Sct. Jacobsgade 9, København.

Finnujo: Magister S. Lambertsen, Albertsgatan 44n B.29, Helsinki.

Nederlando: F-ino T. Visser, 4 Jac. de Graefflaan, Den Haag.

Norvegujo: S-ino A. Haffner, Ingar Neilsens Veg 1a, Oslo.

Svedujo: S-ro S. Stenberg, Viggbyholm skolan, Viggbyholm.

Svisujo: S-ro P. Krahenbuhl, Hotel Helvetie, Montreux.

Adresoj de Perantoj en Ĉeĥoslovakujo, Italujo, Aŭstrujo, kaj Birmo estas haveblaj eĉ la brita filio kontraŭ peto.

Oni povas aranĝi vizitojn al Nederlando, Danujo kaj Svisujo tra la tuta jaro.

E.M.

FILATELA TERMINARO

H. M. Scott

Prezo 9 p. aŭ

3 int. respondkuponoj.

Mendu ĉe I.E.L.

LA NOKTOMEZA MESO

(El *La Libro de Yorick*. Pietro Ferrigni—1836-1895—jurnalisto kaj advokato, vivis en Firenze, kie li kunlaboris sub pseŭdonimo *Yorick filo de Yorick* en diversaj ĵurnaloj, kiel teatra kronikisto kaj kritikisto. Li postlasis multajn librojn, polemikojn, spritajn vojaĝimpresojn kaj vervajn skizojn pri la Firenza vivo. En la peco, kiun mi tradukis, li priskribas vivece kaj laŭnature la publikon atendantan la noktomezan meson de Kristnasko: rim. de tradukinto.)

La preĝejo Sankta Laŭrento en Firenzo. Ĉiuj suraltaraj vaksokandeloj estas ekbruligitaj. Ĉiuj kapeloj estas prilumitaj de la lampoj. La sonoriloj sonoras ekde kvaronhoro. La piuloj ekeniras por la meso. Tra la tri fasadaj pordoj eniras la kontingento el stratoj Ginori kaj Martelli—fraŭlinoj akompanataj de la patrinoj, vendkomizoj, kontistoj, advokataj helpantoj, junaj modistinoj kaj kudristinoj kvarope kaj kvinope, brako en brako; tra la koridoro el Nelli-strato envenas amaso el Camaldoli: cigaristinoj, pantalonkudristinoj, ĉifonistoj, buĉistoj, stratvendistoj, dekope aŭ dekdoupe. Ternoj, tusoj, piedŝovado, grincado de pordhokoj, bruado per seĝoj kaj benkoj trenataj sur la pavimo. Avinoj neparolantaj, ŝtelistoj nevideblaj.

Teresina (envenante tra la centra pordo kaj parolante al *Enrichetta*): Ni iru laŭ la klaŭstra flanko ĝis sub la predikseĝo.

La Patrino: Infaninoj, he! Marŝu malrapide kaj restu ĉe mia robo; alie, duonturniĝon kaj marŝu hejmen. Mi avertas vin!

Enrichetta: Kaj vi, onklino, ne turmentu nin . . . kaj parolu mallaŭte . . . ĉar se oni aŭdas vin, Dio scias kion oni opinios pri ni.

Gigi (envolvita, de post pilastro, vidante la enirantajn knabinojn): Jen estas! (ektuso) Hm! . . .

Teresina (rekonante la tuson): Jen Gigi! (ektusas) Hm! . . .

Enrichetta: Kaj li estas sola! Mi jam diris, ke Arturo ne venos. Se li havas tian bronzan frunton, ke li morgaŭ venos antaŭ miajn piedojn, mi dece regalos lin por la noktomeza meso!

Teresina: Atendu, ne malkvietiĝu. La meso ankoraŭ ne komenciĝis . . .

La Patrino (sidigante kaj elprenante la rozarion): Deus in adiutorium meum intende . . .

Siorino Bit*a (mallaŭte al alia maljunulino apuda, daŭrigante parolon): Tiel, ĵus edziĝinte, Gianni malkovris la tutan sekretan, ŝin prenis ĉe la brako kaj ŝin jetegis ekster la domon tra la ŝtuparo . . .

Siorino Gegia: Konsideru, kia skandalo! Imagu, ĉiujn domanojn! . . .

*Siorino Bit*a: He! ĉi vi povas imagi! . . . des pli, ke sur tiuj kvin etaĝoj estas plene de knabinoj . . . vi vidas do . . . Ankaŭ mia Annina . . .

Siorino Gegia: Kaj kion ŝi faras nun, Annina?

*Siorino Bit*a: Ĉiam ĉe la teatro, la unua de la duarangaj. Kaj kredo, tute sincere, ŝi dancas kiel anĝelo! Sed kiam oni havas timon al Dio kaj nenies favoron, oni ne sukcesas inter la baletistinoj. Baldaŭ ŝi venos ĉi tien por min trovi . . . mi sendis ŝin por diri la kristnaskajn bondezirojn al la edzino de la lampisto.

Siorino Gegia: Tiel malfrue?

*Siorino Bit*a: He! kiam nur estas eble! Sed ne estas danĝero, ja . . . la stratojn ŝi bone konas kaj estas pli lerta ol leterportisto pri la plej rapidaj vojoj.

Teresina (al *Gigi*): Retiriĝu pluen, post la kolonon; panjo vin vidas.

Gigi: Ne, trankviliĝu . . . la predikseĝo ombas.

Teresina: Mi diras, retiriĝu.

La Patrino: . . . Et benedictus fructus . . . kion vi murmuras, *Teresina*? Vi ne silentas momenton . . . *ventris tu' Jesu* . . .

Teresina: He, mi parolis al *Enrichetta*.

Bobi (enirante el la Nelli-strato, kun areto da kunuloj): Kvar kaj sepdek kvin oni elspezis ĉe "La Sonorilo" . . . malbenita azeno . . . unu kaj dek kvin ĉe la kafejo kaj dek por trinkmono, restas kvar frankoj kiel kvar akcidentoj kiuj vin trafu en la koron . . . Kion vi timas, ke mi volas deponi ĉe la ŝparkaso?

Meo (ebrieta): Nu, *Bobi* . . . ne vin apogu al tiu kolono . . . ĝi ŝanceliĝas.

Nanni: Via cerbo ŝanceliĝas, ebriegulo!

Meo: Kiom restas en la kaso?

Bobi: Ĝuste kvar frankoj.

Meo: Ohe . . . oni devas ilin elspezi . . . Se ne, mi faros skandalon, kiel estas vera . . .

La Sakristiano (paŝante): Parolu mallaŭte, je mio, † kaj respektu la preĝejon . . .

Nanni: Kia muŝo zumas en via kapo, kandelmanĝisto? . . . forigu kvar paŝojn de la konturo de miaj ŝuoj . . . ni ne estas de ĉi tiu paroĥo, ni.

La Sakristiano (foriras grumblante): Mi

* Mi tiel tradukas la italan vorton *sora*, popolecan mallongigon de *signora*, kiun oni antaŭmetas al la nomoj de malaltklasaj edziniĝintaj virinoj.—rim. de *trah*.

† anstataŭ je *Dio*.

koleras je la Registaro kiu toleras ĉi tiujn forkurintojn el Le Murate.‡

Caterina: Nanni, pro amo al Dio, ne kompromitu vin, venu ĉi tien . . .

Nanni: Jes . . . ni evitu la okazon . . . Ĉu ni iru en la angulon post la konfesejo?

Caterina: Ne . . . tie estas tro mallume . . .

Nanni: Nu, ĉu vi devas surfadenigi perlojn?

Caterina: Ne, mi volas ne perdi Betta'n.

Nanni: Ne zorgu, ŝi ne perdiĝos . . . kaj se jes, ni aŝos sur la muroj . . .

Caterina: Betta, venu apud min.

Betta: Lasu lokon . . . ĉu vi ne vidas kiel oni estas premata? Nu, vi, kun tiu senkulpa mieno, for la manojn . . .

Iu Sinjoro: Mi? Mi krucoŝignas . . .

Betta: He, kie vi serĉas la sanktan spiriton? Oj!

Caterina: Kio estas, Betta?

Betta: Ne, jen kun la pinĉoj neniel estas saŭce.§ . . .

Meo (ĉiam pli ebria): Saŭco? . . . Kiu diris saŭcon? Fromaĝo kaj butero necesas por la makaronioj . . . kaj vino . . . ĉar liberpensulo fajfas pri ĉiuj simiaĵoj.

Bobo: Kiu puŝas de malantaŭe, ulaĉoj! . . . Se mi lin kaptos, mi donos al li survangon tian, ke la pilastro redonos du! . . .

Caterina: Do, Nanni, ĉu vi haltas aŭ ne? Ni atigos sub la predikseĝon . . .

Teresina (Al Gigi): Etendu la manon . . . jen . . . ĝin legu hejme . . . ĝi estas respondado al la hieraŭa bileto.

Nanni (rimarkante la transdonon de la bileto): He, knaboj . . . pasas la poŝto . . . afrankite alhejme . . .

Teresina (timigita): Sankta Virgulino, oni nin vidis!

Gigi (al Nanni): Cedu lokon, bonulo, ĉu vi ne vidas, ke ĉi tie estas sinjorinoj?

Nanni: Ne . . . ĉu pagis por speciala sidloko la sinjorinoj? Ne zorgu, kara moŝto, mi ŝajnigas ne vidi . . . se vi havas alian depeŝon . . .

La Patrino: Teresina . . . al kiu parolas tiu stratulaĉo?

Nanni: Stratulaĉo? Aŭskultu, ho! . . . montru respekton, bebeca aĝulinaĉo, alie oni vidas belan spektaklon, mi certigas. Vi prefere zorgu pri via filino . . . ke ŝi ne tro uzu la plumon.

Betta (laŭte ridante): Ĉu ŝi surmetis poŝtmarkon?

Caterina (same): Ĉu ŝi sigelis la koverton?

Siorino Bita: Kia bruo! Estas vere hontinde! Mi formoviĝus de ĉi tie se ne estus por atendi Annina'n.

Siorino Gegia: Ŝajnas al mi, ke tiu knabino malfruas . . . Evidente la edzino de la lampisto . . .

Siorino Bita: Ho! Ŝi estas tiel babilema, Dio ŝin benu! . . . kiam ŝi ektiras fadenon . . .

Siorino Gegia: Nu ĉi-fojon la fadeno devas esti longa pli ol iom . . .

Meo (tute ebria, al pasanta akolito): Sinjoro pastro . . . alportu sandviĉon kaj duonlitron . . .

Teresina: Panjo, ni foriru . . . ĉi tie io okazos . . . (mallauĉe al Gigi) Adiaŭ, ĝis morgaŭ.

Betta (kantante): Adiaŭ, bela, adiaŭ . . .

Annina (alvenante senspira, al siorino Bita): Ho! mi vin trovas, jam horon mi priserĉas. La edzino de la lampisto vin salutas . . .

Siorino Bita: Diru . . . infanino . . . vi venis rekte al la preĝejo, he? . . . vi ne faris ĉirkaŭirojn?

Annina: Ĉirkaŭirojn? Jen . . . flaru; mi odoras ankoraŭ de meĉaĝo.

Bobo: Atentu, vi . . . oni komencas . . .

Nanni: Caterina, oni komencas.

Caterina: Kvietu, ĝenulo . . . la meso komenciĝas.

Betta: Haltu . . . haltu, ne puŝu . . . malbenon! . . .

La Pastro (antaŭ la altaro): *Introibo ad altare Dei* . . .

Tradukis S. La Colla, L.K.

NIA CELO

Homoj en la vasta mondo

Havas ĉiuj la esperon,

Ke en unu granda rondo

Ili finu la mizeron.

Kontraŭ la kruela sorto,

Kiun kaŭzis la milito,

Por progreso nun kun forto

Celu mano kaj spirito.

Kiam iu nur kritikis

Kaj nur al obstino logas,

Kion tiu komunikas,

Kredu ne, ĉar li mensogas.

Ĉiu pace laboradu

Kiel vera kreemulo,

Ĉie oni kunhelpadu—

Tio estas la postulo!

En prudenta libereco

Vivos ni en mond' senlima,

Ĉie regos amikeco

Per konsento elanima.

Esperanto formas ligan

Ĝeneralan de l' homaro—

Kaj al tiu cel' instigon

Donu nia kolegaro.

Dediĉita al Grupo "Laboro",

F. Sauer, Germanujo

‡ Firenza malliberejo; § familiara esprimado—estas neniel amuze.

ENIGMA KONKURSO N-ro 8

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj el Konkursko N-ro 6

Enigmo N-ro 15: Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo, tiam en la tuta urbo estos ordo.

Enigmo N-ro 16: La respondo estas: Jes. Por pravi tion mi unue donos pli simplan ekzemplon. Alumetskatolo enhavas maksimume, ni diru, 60 alumetojn. Se, do, ni prenas 60 skatolojn, povas esti ke ĉiuj enhavas inter si malegalajn nombrojn da alumetoj. Sed jam kiam ni prenas 61 skatolojn, nepre devas esti du, kiuj enhavas egalan nombron da alumetoj. Generale oni povas diri, ke se oni prenas pli da skatoloj ol da alumetoj en unu skatolo, nepre devas esti du, kiuj enhavas egalan nombron da alumetoj. Nu, rilate la arbojn. Estas nerefutebla fakto, ke la nombro da arboj, kiuj ekzistas en la mondo, estas multege pli granda ol la nombro da folioj, kiuj povas esti sur kiu ajn arbo. (Iu Nederlanda solvinto kaj iu finna solvinto eĉ sukcese prikalkulis tion). Do nepre devas esti du, kiuj havas la saman nombron da folioj.

Gajnis la premiojn post la kvara konkursko: Pastro J. S. Dinwoodie (73 p.) Skotl., S-ro S. Roelofsen (66.5 p.) Ned., S-ro W. Manders (64.5 p.) Ned. Al ĉiuj tri mi sendis la libroliston el kiu ili mem povas elekti sian premion. Post ili sekvas: S-ro P. E. Schwerin (Aŭstralio) 64 p., S-ro H. Westergaard (Dan.) kaj Pastro D. W. Robson (Brit.) kun po 63.5 p., S-ro Fr. Couwenberg (Belg.) 61 p., S-ro C. Graversen (Dan.) 60.5 p. S-ino N. Koulijs-Modoo (Ned.) 59.5 p., S-ro L. Paeleman (Belg.) 59.5 p., S-ro H. Hasper (Ned.) 59 p., F-ino J. J.v. Thiel (Ned.) 59 p., S-ro E. B. Jörgersen (Dan.) 56 p., S-ro T. K. Slade (Brit.) 55.5 p.

Enigmo N-ro 19.

La tuto konsistas el 70 literoj kaj estas esprimo el la *Proverbaro Esperanta* de D-ro Zamenhof.

2-17-14-35-31-43-50-58-66-8-29 :

havanta neniun intereson pri io.

19-42-69-26-9-16-3-57-70 :

nacia religio de Japanoj.

1-4-52-7-55-68-59-11-6-18 :

bestkuracisto.

24-62-40-46-12-20-10-34-53 :

partiano de la reĝeco.

5-33-41-60-67-39-44-23-56 :

funebra parada podio.

38-32-13-36-22-30-37 :

dentita masonaĵo ĉe la supro de turo.

25-45-21-54-48-15-27 :

pago.

28-51-47-61-65-49 :

nombro el du ciferoj, havanta kvar primfaktorojn inter kiuj du egalaj.

63-64

mallongigo por fifama Germana korpuso.

5 poentoj.

Enigmo N-ro 20.

Al ĉiu el la substantivoj apartenas unu el la adjektivoj. Se vi bone kombinas ilin, la komencliteroj de la adjektivoj, en la sinsekvo de la substantivoj, formas konatan esprimon.

- | | |
|---------------|-----------------|
| 1. kurento | 15. venko |
| 2. ekzemplo | 16. lando |
| 3. spektaklo | 17. societo |
| 4. prezo | 18. temperaturo |
| 5. papilio | 19. kongreso |
| 6. talento | 20. azeno |
| 7. ideo | 21. valoro |
| 8. rigardo | 22. dieto |
| 9. karaktero | 23. odoro |
| 10. migdalo | 24. ĉielo |
| 11. parfumo | 25. deklaracio |
| 12. verkaro | 26. mastro |
| 13. konfido | 27. rikolto |
| 14. dokumento | 28. promeso |

- | | |
|-----------------|---------------|
| 1. abomena | 15. neŭtrala |
| 2. abunda | 16. nobla |
| 3. amara | 17. nominala |
| 4. aŭtentika | 18. normala |
| 5. delikata | 19. obstina |
| 6. efemera | 20. oficiala |
| 7. ekskluziva | 21. originala |
| 8. imitinda | 22. reciproka |
| 9. impertinenta | 23. rigora |
| 10. internacia | 24. solena |
| 11. kontinua | 25. stranga |
| 12. libera | 26. strategia |
| 13. matura | 27. unika |
| 14. modera | 28. vegetara |

5 poentoj.

RAKONTOJ POR GEKNABOJ

de Italo Toscani.

El la itala lingvo tradukis
R. Castagnino.

Prezo 2ŝ. 6p., aŭ 10
respondukuponoj, afrankite.

Mendu ĉe I.E.L.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 186

OFICIALA INFORMILO

5an Septembro, 1946

DELEGITOJ

Denove ni enskribis tiom da novaj delegitoj, ke estas tute neeble listigi ilin en la gazeto. Iliaj nomoj aperos en la dua parto de la Jarlibro, kiu espereble aperos fine de Oktobro.

ŜANĜOJ

Angolo

Gabela. D: vakas.

Brazilo

São Paulo. FD (Bibliotekaj aferoj): nova adreso: Caixa Postal 5888.

Britujo

North Ferriby. D: vakas.

Ĉinujo

Tientsin. D: nova adreso: c/o Fu Chung Produce and Trading Co., 50 Ying-Kow Road.

VD: nova adreso: c/o Chien Hwa Industrial Corporation, 104 Chung Cheng Road.

Danujo

København. FD (Studentaj aferoj): vakas.

Vejle. FD (Virinaj aferoj): vakas.

Finnlando

Sauvo. D kaj FD: vakas.

Norvegujo

Oslo. FD (Statistiko): vakas.

Urugvajo

Peranto. Nova adreso: Rio Negro 1211, Casilla Correo 432, Montevideo.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Aŭgusto, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Aŭgusto 1945:

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	3496	6916
Individuaj Membroj:		
MJ	806	1034
MA	1680	4042
MS	126	248
Patronoj ..	24	24
DM	78	96
HM	16	20
	2730	5464
	6226	12380

Korespondadoj en Aŭgusto:

Ricevitaj	704
Senditaj	829
	1533

DONACOJ por helpi al la forigo de la deficiito: F-ino S. V. Reed 8s. 6p., E. P. B. Cocks 7s. 6p.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo: E. Houzé 83s. 4p., C. M. Hattersley 2s. 3p., I. Gomes Braga £10.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

NASKIĜO

Surmont — Al Ge-sroj Surmont, en Annoeullin, Nord-Francojo, je la 29a Aŭgusto, filino, Marie Thérèse.

Wratten — Je la 18a de Aŭgusto al Basil kaj Maureen Wratten, 14 Kennington Park Road, London, S.E.11, Anglujo, filo John Dion.

EDZIĜO

Newland—Marshall — La 31an Julio Robert A. Newland al F-ino Jean F. Marshall. Nova adreso: 32 Aldenham Avenue, Radlett, Herts., Anglujo.

MORTOJ

Bailey — Je la 5a Aŭgusto, en Dyserth, Kimrujo, mortis William Bailey. Li estis Lingva Komitatano, kaj eble la plej bona aŭtoritato pri la verkoj de Zamenhof.

Klavehn — Je la 15 Julio mortis S-ro R. C. Klavehn, membro en Kilmarnock, Skotlando.

Marootian — Je la 11 Julio mortis Manooq Marootian, antaŭe D. en Long Island City, Usono. Li naskiĝis en Turkujo en 1895.

Walter — En Decembro 1945 mortis pro pulminflamo Carl Walter, Berlin, Germanujo. Bonkora, vigla, kaj helpema, li estis preskaŭ ĉie konata kiel la aŭtoro de *Gaja Lernolibro* kaj similaj libroj.

Kiam vi aĉetas respondkupononjn, atentu ke oni en la ĝusta loko stampas ilin ĉe la poŝtoficejo.

Dufratasocio. Reprezentado. Rua Senador Feijo 29-s407, São Paulo, Brazilo. deziras vendi ĉiuspecajn varojn en Brazilo,

Ilustritajn poŝtkartojn el ĉiuj landoj deziras interŝanĝi. Garantiata respondo. José Contreras Argüelles, Calle de Andalucía 11, Madrid, Hispanujo.

Hispana sporta radiokronikisto deziras korespondi kun ĉiulandaj gesamideanoj pri sportaj temoj. Skribu al S-ro Crescencio López, Radio Castellón, Castellon de la Plana, Hispanujo.

Deziras korespondi kun ne-katolikoj en Buenos Aires kaj Montevideo pri tiuj urbegoj L. F. Hunter, 15 Temple Street, Rugby, Anglujo.

Sinjoro deziras korespondi poŝtkarte kun samideanoj el ĉiuj landoj. Nepre respondos. S-ro F. C. Rudman, 28 Wolverton Road, Newport Pagnell, Bucks., Anglujo.

Deziras rilatiĝi kun komercistoj por reprezenti iliajn artiklojn Popelier Stephanie, Jacques De Meyerstr. 16, Blankenberge, Belgujo.

Enrico Bocciardo, Piazza Vittorio Veneto 6, Lavagna (Genova), Italujo interŝanĝas p.m. italaĵn aŭ alilandajn, kvanton kontraŭ kvanto, aŭ laŭ Yvert; certe respondas; ne sendas unua.

Emilio Vecchio, Via Sarpi 15, Milano, Italujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Certe respondos.

Giuseppe Danove, Canelli (Asti), Italujo, deziras interŝanĝi p.m. el ĉiuj landoj.

G. Dassenno, Corso Carbonara 2, Genova, Italujo deziras korespondi kun S-roj Direktoroj de Kooperativoj pri ebleco de Esperanto-Kooperativoj internaciaj.

Filatelistoj! Fermo Martini Alberto, Via Aleardi 38, Firenze, Italujo organizas dum Januaro 1947 grandan ekspozicion pri poŝtkartoj ilustritaj kaj kovertoj kun interesaj poŝtmarkoj por starigi universalan kunfratecon. Oni serĉas agentojn-korespondantojn en tutmondo: certe respondos.

Poŝtenis-ludo. Prezo 3 ŝil., aŭ egalvaloro en viaj valutoj. M. Krcha, Praha XIX, Nikola Teslastr. 10, Ĉeĥoslovakujo.

Interŝanĝas pm. k. ĉ. l. Pastro Severino Torresani, Parroquia San Roque, Plaza 1160, Buenos Aires, Argentino.

S-ano Giovanni Della Savia, Delegito de IEL en Udine, Italujo, Via Asilo M. Volpe 47, kontraŭ 50-100 pm. de via lando sendas saman kvanton de italoj. Ĉiam respondos.

Mi tre volonte korespondus kun gesamideanoj el la tuta mondo, ankaŭ el Svislando, pri interesaj aferoj, kaj mi volus interŝanĝi interesajn objektojn, ekz. jurnalajn, bildojn, il. gazetojn, fotografajojn, prospektojn, k.t.p. Nepre respondos. Jožka Škopil, komercisto, Tábor 235, Ĉeĥoslovakujo.

ESPERANTISTOJ

kiuj deziras ebligi vojaĝadon de gejunuloj (plejparte 16-35 jaraj) sen grandaj monrimedoj, pere de libervolaj feriaj centroj en diversaj landoj, per pruntoj de konstruaĵoj, aŭ per kontakto kun la vizitantoj, aŭ kiuj deziras iamaniere subteni internacian amikecon, estas petataj skribi al la

INTERNACIA AMIKECO-LIGO

33 Gordon Square, London, W.C.1, Anglujo

aŭ al iu el ĝiaj filioj en aliaj landoj.

Filioj en: Nederlando, Francujo, Belgujo, Danujo, Svedujo, Norvegujo, Finnlando, Svisujo, kaj Ĉeĥoslovakujo.

Kontaktoj en: Irlando, Italujo, Aŭstrujo, Italujo, Irako, Birmo, kaj Hindujo.

SYNNOVE SOLBAKKEN

de
BJØRNSTJERNE BJØRNSON



Tre interesa norvega rakonto

Tradukis
E. KAJ A. WEIDE



96 paĝoj

Prezo 2 ŝil. aŭfranko 2p.
aŭ 8 internaciaj respondkuponoj

Mendu ĉe I.E.L.

RIDO SANIGAS

Elektitaj humoraĵoj



Kolektitaj de
IVAN GEORGIEV kaj
TODOR ISEV



Prezo aŭfrankite 9 pencej aŭ
3 internaciaj respondkuponoj

Mendu ĉe I.E.L.

LA UNIVERSALA POSTMARKA REVUO

La unua numero aperis en Aŭgusto kaj rezultis multaj gratulaj leteroj. La Septembra numero enhavos longan artikolon sub la titolo "Tri mil jaroj de poŝto".

Ankaŭ aperos adresoj el 27 landoj pri pm. interŝanĝo; ni celas enpresigi nomojn el ĉiu lando de la mondo por montri kiel disvastigita kaj utila estas nia lingvo.

Ĉiu membro rajtas enpresigi sian nomon por pm. interŝanĝo, kaj la kotizo, kiu kovras ĉiujn servojn de la Asocio—La Internacia Asocio de Poŝtmark-Kolektantoj—estas nur kvin anglaj ŝilingoj.

Sendu neuzitan poŝtmarkon de via lando ĝis la valoro de unu respondkupono por ekzemplero de la Revuo kaj aliaj detaloj.

Centra Oficejo: XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo.